Mevr. Verwimp pleitte vooral voor Esperanto als bescherming van het Nederlands in de Europese Unie en als dam tegen het overwicht van het Engels. De heer Gilbert Vanleenhove, voorzitter van de commissie, oordeelt dat het Nederlands niet bedreigd is. Toch meent hij dat de keuze van het Esperanto als brugtaal in Europa niet uitgesloten is. De heer Luc Van den Bossche, minister van Onderwijs, verklaarde dat het onderwijs geen proefterrein voor experimenten mag zijn.

De resolutie werd verworpen met 12 stemmen tegen 1.

Toch is de mogelijke rol van het Esperanto in de Europese Unie weer eens besproken.

Opvallend is het standpunt van de heer Vanleenhove.

WEEK VAN DE VOLKSONTWIKKELING (12 TOT 19 OKTOBER 1996)

1. GENT

Richtte snelcursus in op 12 en 19 oktober.

10 inschrijvingen en 15 deelnemers.

Weerklank is vnl te danken aan het bezoek van Arie Bouman aan de redacties van De Streekkrant en Het Nieuwsblad. Beiden schreven een artikel en De Streekkrant stuurde zelfs een fotograaf. Gent gebruikte ook de affiches van de dienst Volksontwikkeling.

2. OOSTENDE

Organiseerde op 16 oktober 1996 een publieke informatievergadering rond Kthe Kolwitz. Dit werd aangekondigd d.m.v. speciale affiches van de Dienst Volksontwikkeling en verspreid door de stadsdiensten.

16 aanwezigen, o.m. de Raf Seys uit Koekelare, auteur van het boek "Het treurende Ouderpaar" en vertaald in Esperanto door Raymond Wylleman.

3. ANTWERPEN

Briefschrijfactie van Amnesty International in het clubhuis met als thema: "Mensenrechten in Turkije" op 12 oktober. Gelijkzeitig was er een tentoonstelling over dit thema. Bitter weinig belangstelling op de dag zelf, maar er kwamen toch brieven binnen van clubleden en medewerkers van het centrum, zodat in totaal er een 50 b 60 brieven werden verzonden.

KATALOGO HAVEBLA

Germana Esperanto-Biblioteko nun disponigas sian aktualan katalogon sur disketo 3,5 cola por uzo per komputilo IBM-kongrua. Kontraŭ 15 DEM / 18 NLG (B landanoj laŭ UEA grupigo ricevas 50 %-an rabaton) oni sendas gin sen kromkostoj. Antaŭpagu al Ottmar Jareb (Blüherstr. 42, D-71116 Gärtringen, Germanio), UEA-konto: otja-u.

Pli ol 10.000 unuoj listiĝis; aktualigoj aperos regule.

Adolf Burkhardt

MINIATURA EŬROPO EN BIEVRE (B)

Je 5-7 julio 1996 kunvenis 15 delegacioj (el po unu komunumo de EO-ŝtato) kun komuna intereso: ligno (arbarkulturo, segejoj, meblofarado). Laborlingvo estis la franca (lingvo de la regiono), kun tradukoj al la angla kaj la germana.

Mi eksciis pri la renkontiĝo per ĵurnala artikolo. Telefone mi kontaktis skabenon de Bièvre kaj mi donis koncizan klarigon pri Esperanto. Li sendis al mi liston de la delegacioj kaj invitis min ĉeesti la "aperitivan" je la lasta tago.

Je dimanĉo 7 julio mi partoprenis la oficialan ceremonion, dum kiu prelegis ministro Lebrun kaj provinc-estro Dahlem (ambaŭi nur en la franca, sen traduko !) Sub granda tendo troviĝis ĉ. 400 personoj, membroj de la delegacioj, sed ankŭ vilaĝanoj ĉe kiuj la eksterlandanoj logis. Mi kunportis kovertojn kun Esperanto-informoj en la lingvo de ĉiuj delegacioj, sed estis malfacile trovi ilin. Tamen mi sukcesis havi kontakton kun:

Nederlandanoj: Ili estis kontentaj audi iun paroli en la nederlanda. Laŭ ili la angla interpretado ne estis perfekta kaj ili ne komprenis la uzitajn fakvortojn. Favoraj al Esperanto.

Portugaloj: Ĉar nenio okazis en la portugala, tiuj tagoj estis tre penigaj kaj sentis nepran bezonon de internacia lingvo.

Danoj: Laŭ ili, la angla kaj la germana ne sufiĉis kaj Esperanto estus solvo.

Italoj: El la dekpersona delegacio, nur unu scipovis la francan. Ili estis favoraj al Esperanto.

Irlandanoj: Opiniis ke Esperanto solvus lingvo-problemojn.

Francoj: Kvankam ili ne havis problemojn, ili tamen bedaŭris mankon de kontaktoj kun aliaj delegacioj pro lingvaj kialoj.

Finnoj: Agnoskis argumenton favoran al Esperanto, ĉar ili havis kontaktojn nur per la angla.

Luksemburganoj: La gvidanto estis reprezentanto de la lignistoj kaj kunordiganto de la organizo pri Eŭropaj Komunumoj. Laŭ lia respondo, li ne kontraŭus Esperanton.

Ĉiuj kontaktitoj atente aŭskultis mian argumentadon kaj ricevis informon pri Esperanto en sia lingvo. Verŝajne, ili pli facile akceptis la ideon de internacia lingvo, ĉar dum la pasintaj tagoj ili spertis la problemojn pro manko de komuna lingvo.

Post la renkontiĝo mi sendis leteron kun i.a. listo de la delegacioj al UEAdelegito en la regiono de 14 delegacioj kaj al la landaj asocioj. Ĉefdelegito de Aŭstrio dankis pro la senditaj informoj.

Maurice WOUTERS (Rue des Cafrancs 10, 5520 ONHAYE)

INTERŜANĜO DE SPERTOJ PRI LA STRATEGIAJ PROJEKTOJ DE FEL
ANTVERPENO, 14 SEPTEMBRO 1996

Enkonduko

La celo de la antaŭtagmezo estis prezenti ĉiujn projektojn unu post la alia, kun indiko de la enhavo, la aferstato kaj la farotaĵoj en la sekvaj monatoj. Tiel la respektivaj iniciantintoj tuj aŭdis sugestojn de kolegoj kiuj do same ion lernas. Ĉi-sube ni koncize trarigardas la diversajn projektojn.

Aldonoj al la listo de projektogvidantoj

Aldone al la (nederlandlingva) listo aperinta en la antaŭa numero (14) de Verikale, jen ankoraŭ kelkaj informoj.

Marc CUFFEZ

Verder militair in dienst bij de Rijkswacht.

Belgisch afgevaardigde van IKUEJ en LSG, secretaris 'La Konko' en bevoegd voor jongerenwerking. Bestuurslid Culturele Raad Oostende, bestuurslid VU-Oostende, penningmeester KWB St-Jan Oostende.

Herman DECEUNINCK Adres: telefoon 02/361.36.17

Guido VAN DAMME

geeft zijn projekt M6 vrij, wegens te veel werk in het Esperanto-Centrum.

Voor de volgende projecten zoeken we nog een projectleider:

I6 (=A116, informatiediskettes uitwerken);

I9 (=A141, contacten met economische organisaties opzetten);

M3(=A801, diversificatie van de economische activiteiten realiseren) en M10 (=A802, een winkel van landkaarten en boeken opzetten);

M4 (=A904/A808, wegen opzetten naar financiële middelen);

M6 (=A804, Vlaamse deelname in een vertaalbureau);

M9 (=A905, een documentatiecentrum opzetten);

V5 (=A402c, cursussen voor video/televisie invoeren);

P7 (=A706, gevarieerd sprekersaanbod in de groepen verzekeren) en P4 (=A705, gevarieerde groepsprogramma's uitwerken en invoeren).

Prezentado de la projektoj

Projekto 18 (=A131, kontaktoj kun socikulturaj organizaĵoj) malaperos el la listo. Ĝi ja ne estas vera projekto, sed atentopunkto por ĉiu grupo kaj unuopolo. En la posttagmeza kunveno tiu punkto ankaŭ estos priparolata.

Bert Boon, P2: en ĉiu grupo almenaŭ monata aktiveco ne ĉeestas pro malsano.

Frans Croon, V4 (organizado de rapidkursoj) kaj V7 (organizado de vesperkursoj).

Ne jam komencis agadi, jes jam pripensadis la projekton. Necesas unuflanke plialtigi la

kvaliton de la kursoj, aliflanke ŝtopi la geografiajn breĉojn. Frans intencas inventari kio jam okazis kaj kiel; kiu estas libera por gvidi kurson (tion la ĉeestantoj rekonas kiel baza problemo). Ankaŭ li intencas kontroli la rezultatojn de la rapid- (kaj aliaj?) kursoj: kiom da kursanoj lernis en tiuj kursoj kaj kio/kiu postrestas. Frans do preparos demandaron, post aranĝos kunvenon pri la respondoj .

Marc Cuffez, V10 (unu nacia informa broŝuro por la kursoj).

Marc jam preparis leteron al la grupoj por ke tiuj sendu informojn pri siaj kursoj. La broŝuro farota direktiĝos unuavice al ne-Esperantistoj, ĝi estos ĉiujare adaptota. Jam ekzistas speciala numero de Horizontaal, kion do alportas la nova broŝuro? Precipe ĝi estos pli detala pri la kursoj, ĝi estos havebla dum la tuta jaro, ne nur en septembro, ĝi estos sendota al homoj kiuj ne jam estas FEL-membroj.

La ĉeestantoj sentas kaj insistas ke eblas uzi Horizontaal-numeron por la samaj celoj. Utilas adapti la enhavon, sed eblas sendi ankaŭ tiun numeron al aliaj homoj, dum la tuta jaro, ktp. Ivo aperigos liston de ricevantoj de tiu Horizontaal-numero en Vertikale (ne laŭnome, sed laŭkategorie). Ankaŭ li preparolos kun Marc proceduron por aldoni adresojn al tiu listo de ricevontoj, fare de la grupoj.

La broŝuro enhavu tri partiojn:

1. kio estas Esperanto;
2. informoj pri la kursoj en Flandrio;
3. aktualaj informoj pri la kursoj (ekzemple la mezaj pagoj).

Unue la enhavo estos ellaborita, nur poste la formo.

Marc strebas al findato en junio 1997.

Herman Deceuninck, P6 (strukturo por individuaj agantoj).

Herman baldaŭ komencos. Li sekvan semajnon faros sian projektplanon kaj loglibron.

Celo de la projekto estas ke la agantoj kiujn ni nun ne vidas ekagu en la aktivecoj de FEL. Eblas ekzemple traduki libron, informadi, ktp. Herman inventarigos la eblecojn por aktiva agado, kaj disponigos tiujn. Li pensas pri elektronika poŝto kiel medio, sed certe ne nur tio (ĉar ne ĉiu disponas pri ĝi)

Ilja De Coster, 13 (aliro al la junularoj) kaj P5 (stimuli partoprenon en intemaciaj aranĝoj). Pri P5 unue. Post la 22a de junio Ilja unue faris sian projektplanon. Nun preparas statistikojn: kiom da flandroj ĉeestis en aranĝoj internaciaj.

Li verkos artikolon por Horizontaal: alvoko por organizi vojaĝojn komunajn kaj dissendi informojn pri tio; per tia komuna vojaĝo la sojlotimo ĉe novuloj malpliigu. Iu 'enkonduku' ĉiun novulon unuopan en la aranĝo kaj movado. Ankaŭ la financa flanko apartenas al la projekto: la helpfonduso, sed ankaŭ grupvojaĝoj (=malpli multekostaj).

Poste pri 13: Argumentoj ne ĉiam trafas junulojn: necesas aliaj. Ĝis nun la projekto limiĝis al informmaterialo, pri plilarĝigo ne jam estas klaraj ideoj. Por komenci Ilja ellaboros serion da broŝuroj por junuloj. Jam komenciĝis io tia je eŭropa nivelo.

Helpu: kiu havas ideojn? Kiu havas (pli malnovajn) dokumentojn? Por pripensi: kiel komerca firmao atingas siajn junulojn?

Grava problemo: malmultaj disponeblaj homoj en FLEJA.

Sugesto: kunigi teoriajn kaj praktikajn eblojn.

Helpu: Se en kurso aliĝas junuloj, kontaktigu ilin kun FLEJA.

Bart Demeyere, 17 (stimuli ĉeeston en Internet).
ne ĉeestas (avertis), sed Ilja De Coster iom klarigis.
Estis jam du kunvenoj, enhance pri FLEJA-pagoj kaj pri teknikaj eblecoj. Ĉu limigi al FLEJA?

Wim Desmet, 110 (enkonduki pli taugan argumentaron), V3 (formado de aktivuloj pri aktivadoj) kaj V5 (memstudadaj kaj korespondaj kursoj).
ne ĉeestas (antaŭavertis), sed Ivo Durwael iom klarigis.
La projektplanojn Ivo ricevis, sed li ne havas ideojn pri la aferstato. La unuaj templimoj estas fine de decembro '96, poste '97.

Ivo Durwael, M2 (redifini la flandrajn Esperanto-strukturojn), M7 (aljuĝi kiom eble tekstojn al multaj uloj) kaj M8 (nova sistemo pri membreco).
Pri M2 unue: Ivo sugestis diskuton kun la grupoj pri tio. Kvar grupoj reagis, sed la rezulto estas negativa en ĉuj kvare. Plue diskutota posttagmeze. Poste pri M7: Ivo faris liston de taskoj disdoneblaj kaj sendis ĝin al ĉiuj 21 personoj kiuj montris intereson pri tiu projekto. Reagis Herman Deceuninck (tralegi gazetojn), Mireille Storms (ideo: presi enir- kaj tombolokartojn en la centro kun reklamo por Esperanto), Marc Vanden Bempt (kontaktoj, traduki el Esperanto, prelegoj, libroservo), Bob Boon (kontaktoj, reprezentado, alia kiun la raportanto ne plu povas legi), Marc Cuffez (raportoj por 'Rondblik', ks), Ilja De Coster (raportoj, kontaktoj, informbudo).
Sugesto: aperigi la liston por pli larĝa publiko (vidu aldona listo), ankaŭ al neesperantistoj.
Helpu: ĉu vi konas aliajn volontulojn?
Fine pri M8: Vidu posttagmezon.

Robbie Edmonds, V9 (enkonduki komputilan kurson).
ne ĉeestas.
Estas kontaktoj kun Leo kaj Paul De Cooman.

Roger Goris, P3 (jara aktiveco Flandrio-Valonio).
ne ĉeestas (antaŭavertis), sed Ivo Durwael iom klarigis.
Roger havis jam kontaktojn kun Valonio (Delforge, Sossois). La unua posttagmeze ĉeestis por ekkoni niajn planojn. Ili entuziasmiĝis pri la projekto. Roger ĉeestos la APE-kunevon en venonta semajno.
Ili tre konkretigos la projekton, kun rezultato en 1997.

Ingrid Lievens, M5 (sistemo pri kunordigado de grupaktivecoj).
Ingrid ne bezonas projektplanon.
Hans Delnat akceptis funkcii kiel telefona centro pri aktivecoj kiuj povas interesi aliajn. Tiujn li enmetos en kalendaro, tiel ke la grupoj povu kontroli ĉu jam okazas aliaj aranĝoj en datoj kiam ili ion planas.
Sugesto: Eventoj jam faras tiun agadon, internaciskale. Ĉu komenci paralelan agadon? Tiu punkto ne estas findiskutata.. Eventoj certe preferindas rilate al naciaj kaj internaciaj aranĝoj, sed ĉu ankaŭ por lokaj aranĝoj? Eble tion la Esperanto-centro povus fari (sed venis negativa reago pri tio al la centro mem) → pridiskutota.
La ideo mem estas grava kaj akceptata.

Katja Lödör, V8 (kiel enkonduki kursanojn en grupon).
Katja jam antaŭ monatoj ellaboris sugestojn por enkonduki novulojn. Tion ŝi faris en

kunlaboro kun kelkaj personoj. Ĉiu grupo nun havas sian enketon, redonendan antaŭ la fino de septembro. Post ricevo Katja faros raporton, publikigotan ankaŭ en Vertikale.

Marc Vanden Bempt, 14 (norma aro da informaj presaĵoj), V2 (praktika manlibro por aktivuloj) kaj M1 (certigi projectecan realigadon de la plano).

Unue pri 14: Marc jam ricevis de Gent, Oostende, Tienen kaj Leuven la informan pakaĵon. Al aliaj li ankoraŭ petu. Surbaze de tiuj li proponos norman pakaĵon priparolotan.

Helpu: la aliaj grupoj sendu pakaĵon kiel ekzemplo, kiel ili ĝin sendas al iu neEsperantistoj kiuj petas informojn.

Poste pri V2: La manlibro ekzistas sur disketo duone kontrollegata. Marc preparos ankoraŭ unun faskon de la nuna serio, poste li pretigos la manlibron sur disketo + en libro. La nefiksajn informojn li forigos el la manlibro, por kunigi tiujn en Vertikale. Mankas ankaŭ la tempo. Finota en 1997.

Helpu: sugestoj por programaro 'hypertekst' por la disketa formo? Fine pri M1: okazis la SIA-kunveno en februaro kadrokurso en Leuven en junio kaj ĉi tiu kunordiga kunveno en septembro. Daŭre aperu raportoj en Vertikale pri la projektoj. En 1997 la planoj estos aktualigataj kaj profundigataj, novaj projektoj startos.

Helpu: verki raportojn por Vertikale.

Walter Vandenkieboom, 11 (enkonduki aktivan gazetaran servon).

Walter havas plurajn ideojn. Necesas kontinueco en la gazetara agado, la ĵurnalistoj konu la kontakthomojn persone. Tiuj lastaj estu prefere profesuloj (aktivaj en ĵurnalismo, aŭ komunikadscienculoj). Ili prefere lokiĝu en Bruselo, pro ĉeesto de Gazetarentro. La projekto ne limiĝu al gazetaro: ankaŭ televido, radio.

Nun necesas telefoni, faksi, eventuale skribi daŭre al gazetistoj, tiel ke ekkonu vin. La lokaj grupoj povas tion aranĝi mem.

Helena Van der Steen, projekto fiksota ne ĉeestas (antaŭavertita).

Myriam Van der Steen, P8 (serĉpromenoj en nederlanda kaj Esperanto).
ne ĉeestas (antaŭavertita).

La projektplano estas farita. Katja sugestas ke la celo de serĉpromeno povos esti (kiel en Gento) ke kursanoj kontaktiĝu kaj interkonatiĝu.

Flory Witdoeckt, P1 (organizigi eventojn intemaciajn) kaj P9 (Esperanto-adreso en turismaj lokoj).

Unue pri P1: En 1999 Oostende organizos Eŭropan Eo-kongreson. Ĝi estos dulingva: ankaŭ por fakuloj estu loko en la programo. Ankaŭ rilate al Colwitz organiziĝos io (Koekelare).

Ivo proponas fari raporton pri la praktika organizado de Antwerpen '93-96 (por Vertikale?).
Poste pri P9: En Oostende tiu adreso jam troviĝas. Ankoraŭ fareda: sugestoj al aliaj grupoj pri la utilo de tiu adreso + instigi doni sian adreson tie.

Raymond Wyleman, 12 (utiligo de radio kaj televido, 15 (informaj kontaktoj ĉe edukaj instancoj), V1 (normo pri Esperanto-instruisto kaj ekzamenoj) kaj V6 (oficialaj kursoj en lernejoj).
ne ĉeestas.

Diversaĵoj

Mankas ankoraŭ pluraj projekplanoj ĉe Ivo Durwael. La iniciatintoj bonvolu sendi ĝin (en kiu ajn formo, se la bazo estas tro komplika aŭ fremda). Gravas dum kelkaj minutoj pripensi kaj do noti, kion precize vi faros, kiel kaj je kiuj datoj: tio ja estas la plano (kiu ajn estu la formo, la norma formo nur povas helpi al vi).

Ivo jam havis tiujn de Katja Lödör. Wim Desmet, Marc Vanden Bempt (+ loglibro), Ilja De Coster, Myriam Van der Steen (+ loglibroj) kaj Marc Cuffez.

Antwerpen, 1 juli 1996

Beste,

Tijdens het colloquium van Leuven nam ik het op mij om "Taken aan zoveel mogelijk meewerkers" door te spelen. Ik denk in de eerste plaats aan die taken, die ik zou moeten of willen uitvoeren, maar waar ik niet toe kom. Die lijst vind je hieronder. Ik denk dat we ook heel wat tijd en energie kunnen besparen met te zoeken naar taken, die in een plaatselijke club gebeuren, maar die eigenlijk het lokaal niveau overstijgen. O.a. daarvoor reken ik op jou voor aanvullingen van deze lijst. Tegelijk vraag ik je om eventueel je naam in te vullen naast een onderwerp dat je aanspreekt of de naam te vermelden van iemand, die ik zou kunnen aanspreken.

Ik verwacht jouw aanvullingen en opmerkingen zo mogelijk vóór 1 september e.k. Gebruik zo nodig de rugzijde van dit blad. Bedankt op voorhand !

Ivo Durwael

Contacten leggen met andere organisaties, zoveel mogelijk persoonlijk, en in die organisaties onze diensten aanbieden.

Contacten met de nationale pers, zoveel mogelijk door bezoek aan de redacties.

Contacten met radio en televisie, zo mogelijk door persoonlijke gesprekken met programmaverantwoordelijken.

Regelmatig krantencommuniqué's opstellen over Esperanto-activiteiten, met vermelding van de bijdrage van FEL of van plaatselijke Esperantosprekers. Informatieteksten, -artikels aanbieden aan tijdschriften.

Reclames werven voor Monato en Horizontaal.

Nieuwe uitgaven van FEL voorstellen en bespreken in cursussen, clubs, tijdschriften.

Boeken in boekhandels deponeren.

De opzoekingsbibliotheek van FEL ordenen.

De opzoekingsbibliotheek bekend maken.

Contacten met leraars i.v.m. een les over taalproblemen en Esperanto. Deelnemen aan infobeurzen.

Aanwezigheid op plaatsen waar veel volk aanwezig is (infobord, folders)

Deelnemen aan debatten en colloquia over taalproblemen

Enquêtes organiseren

Lobbyen bij invloedrijke personen of organisaties

Rapporten van deelnemers aan internationale Esperanto-activiteiten verzamelen voor de rubriek Rondblik van Horizontaal

De tijdschriftenbibliotheek ordenen.
Opruiming in het Esperanto-centrum.
Het overtollige materiaal uit het centrum verwijderen.
De zolder van het centrum terug opfrissen tot een vergaderruimte.
Opfrissen van het Esperanto-centrum.
Ons vergaderlokaal te huur aanbieden aan andere organisaties.
Boekendienst van FEL waarnemen op verschillende plaatsen.
Vertaalwerk uit Vlaamse literatuur.
Proeflezen van manuscripten.
Interessante teksten over Esperanto vertalen en zetten.

FONDAĴO VANBIERVLIET KORTRIJK

Jen (nekompleta) listo de revuonumeroj kiuj mankas en bindotaj jarkolektoj de revuoj.
Bonvolu kontroli en via arĥivo ĉu eble iuj el la bezonataj revuoj estas je dispono. Ankaŭ zorgo faritaj fotokopioj estas bonvenaj.
Pliaj listoj sekvos depende de disponeblaj homfortoj. Multaj duoblajoj estas interŝangeblaj.

Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
Stadsbibliotheek Kortrijk Leiestraat 30, 8500 Kortrijk

Aŭstria E-Revuo: 1-3/89, 7-9/90, ĉio ekde 7/94
Brita Esperantisto: julio-aug. 90, jan.-feb. 93, jan.-feb. 96, majo-junio 96
Bulgara Esperantisto: nov. 92
La dua jarcento: 166, 167, ĉio ekde 169
EI Popola Ĉinio: 94: 5, 11
L'Esperanto (Italio): 5-8/88, 4,5,9/89, 9/91 k.s. (ekzistas ?), 10/92 k.s. (ekzistas ?), 5/93, ĉio ekde 10/93
Esperanto Aktuell: 1989: 1; 1990: 4, 6; 1993: 1, 7; 1994: 3; ĉio ekde 94-5
Esperanto en Skotlando: 162, ĉio ekde 165
La Espero (Svenska...): 89-3, 89-5 k.s.; 90-4 k.s.; 91-2 k.s.
La Eta Gazeto: 3/92, 8/92, 70, 71, ĉio ekde 73
Eventoj: 3, 4, 18, ĉio post 70
Fonto: 123, 124, 127, 128, 133-136, 139-140, 144, ĉio ekde 147 krom 166 kaj 179
Franca Esperantisto: 435, 447, 448, 452, 455, 457, 463, 472
GEJ-Gazeto: 5/88, 2 k 5/89, 3/90 k.s., 3/91, 3/92, 2 k 5/93, ĉio post 1/94
Heroldo de Esperanto: 1881, 1919, 1920
Juna Amiko: 48, 49, 52, 59, 72, 74, ĉio ekde 77
Litova Stelo: 2/94, 2/95, ĉio ekde 5/95
La Revuo Orienta: 3-4/88
Sennaciulo: 1020, 1030, 1036
Tejo Tutmonde: 46, 59, 60, 65, 66, ĉio ekde 68
Le Travailleur Espérantiste: 125-126, 128, 131, 133, 134, 136, 137, 139, 142, 144, 145, 147-157, 159, 183...

JARKUNVENO DE BEF – BRUSELO, 12 OKTOBRO 1996

Ĉeestis: Clara BRACKE (EBG), Sabine BRISON (EBG), Marcel DELFORGE (APE), Dina DELOYER (EBG), Wim DE SMET (FEL), Lucien DE SUTTER (BEFA), Stella DE WEERT (FEL), Elfriede ERNST (EBG), Hélène FALK (EBG), Palmyre FLAMAND (EBG), Walter VANDENKIEBOOM (FEL), Jan KUSTERS (FEL), Grégoire MAERTENS (FEL), André MERTENS-GOSSSENS, Paul MOULING (EBG), Renée OST (FEL), Roland ROTSAERT (FEL), Georges SOSSOIS (APE), Francine SPERBER (EBG), Raimond STEENHOUT (BEFA), Jules VERSTRAETEN (FEL), Flory WITDOEKT (FEL), Maurice WOUTERS (APE)

Senkulpigis: Marc DEMONTY (EBG), Angelos TSIRIMOKOS (EBG), Raymond WYLLEMAN (FEL)

Prezidis: Georges SOSSOIS

Protokolis : Sabine BRISON + Hélène FALK

Kunsido komenciĝas je 13h 3/4 :

1. listo de ĉeestantoj establiĝas

2. la raporto de la 14-10-95 estas aprobita post du rimarkoj:

- (WdS) estas BEF kiu organizis la kunvenon en Huyzingen en Julio 95; (MD) la ideo fontis el la grupo de Charleroi kaj estis farita sub la nomo de APE por ricevi subvencion.
- MD malkonsentas kun la lasta frazo de la raporto (afero malklara). BEF pagis la vojaĝkostojn de la grupo ASORTI kaj ricevis 3.900 fr de la grupoj kie ASORTI donis spektaklon

3. Por la financa raporto, detala financa situacio estas skribe disdonata al la ĉeestantoj, ĝi estas unuanime aprobita post kelkaj demandoj pri ciferoj.

La propono de GM ke BEF konservu kiel maklerajo 5% el la donacoj estas unuanime aprobita. MD petas ke oni ne pagu rekte al UEA sian aligilon sed pere de BEF aŭ de FEL.

En la diskuto, oni ekscias:

- ke la Esperanta Eŭropa Unio (EEU) translokiĝos je la unua de januaro 1997 el Bruselo al Bonn. Tiam la Belgoj ne plu devos tiom financi ĝin ĉar la Germanoj devos financi plie (GM).
- ke EEU jam proponis al Germain PIRLOT financi lian kampanjon ee la Eŭropaj parlamentanoj sed ke li rifuzis tiun helpon (GM) .

4- Fondaĵoj (rentoj) : skriba raporto estis disdonata.

- De la fondaĵo JAUMOTTE-LOQUET beneficas nur APE kaj FEL. En jaro 1995, post la bankaj kostoj kaj la 10% maklerajo de BEF, restas 7.080 fr al FEL kaj 7.079 al APE.

- Fondaĵo Elfriede ERNST: post la bankaj kostoj kaj la 10% maklerajo de BEF restas 66.885 fr disdividita inter kvar beneficuloj: APE, FEL, EBG ricevas po ĉu $1/3 = 3 \times 18.000$ F.

EEC/EEU: $1/5$ (rondigita saldo) = 12.885 fr

5. Agadoj FEL/APE/EBG/diversaj

5.1. FEL: FEL frontas gravan zorgon. Dekrete, la flandra registaro ŝanĝis la sistemon de subvenciado al kulturaj organizaĵoj. Ĝi distingas inter asocioj, instancoj kaj servoj. FEL iĝis SERVO, kio signifas ke la subvencioj dependas de la servoj kiujn ĝi donas al flandraj asocioj kiel ekzemple prelegon en la "Davidsfonds". Tiu nova statuto postulas kompletan ŝanĝon de la agado de FEL, kiu ne plu povas disvolviĝi laŭ sia propra dinamiko. Ekzemple, FEL devis rezigni pri la ĵus naskita komuna revuo kun nederlandaj esperantistoj ĉar ne estas subvencioj por flandraj servoj kupolitaj kun eksterflandra organizaĵo. Do, de januaro 96, FEN-X estas nova revuo por Nederlando kaj HORIZONTALAAL denove celas nur la Flandrojn. FEL plu serĉas kiel agi por konservi la subvenciojn. GS proponis helpon de BEF por trovi novajn irvojojn sed FEL opinias ke ĝi mem devas trovi solvojn.

5.2. APE: Apud la tutlanda somera semajnfino en COUVIN, APE ĉefe agadas interklube kun Flandraj kluboj.

G. SOSSOIS partoprenis la CIBERNETIKAN KONGRESON en Namur kie li defendis la pedagogian valoron de Esperanto.

M. WOUTERS ĉeestis en Julio EŬROPAN RENKONTON DE LIGNAĴISTOJ dum kiu li povis konsciiĝi la partoprenantojn pri la mankoj de la tradukservo kaj disdonis precizajn informojn pri Esperanto kaj la eblecoj lerni ĝin. Li volonte sendos raporton al la interesitaj BEFanoj.

5.3. EBG: partoprenis en HEYZEL la lingvo-foiron en kiu APE-anoj kaj FELanoj ankaŭ deĵoris. Membroj de EBG deĵoris je la festo de 1a de majo kune kun SAT-anoj en senpaga budo disponigita al Esperanto. EBG kiel kutime organizis tutlandan Zamenhoffeston, ĉiusemajnajn kunvenojn kaj kursojn en Sciencostrato. En la ULB, la nombro de kursanoj ne kreskas malgraŭ vigla informado. Eble pli bone koncentri estonte siajn klopodojn en la Sciencostrato.

5.4. BEFA: partoprenis multajn internaciajn fervojistajn kunvenojn inter kiuj la kongreso en HAGO arigis 300 homojn.

5.5. INTERNET: C. GLADY, estrarano de EBG preparas paĝon por anonci la aktivaĵojn de APE kaj de EBG, kiel jam ekzistas por FEL. Proksimuma kosto: 6.000 frankoj jare. BEF tuj oficialigas tiun kunlaboron: FEL-APE-EBG. La nova paĝo aperigos de 1a la de januaro 1997.

5.6. Respondante al demando de F. WITDOEKT, EBG (HF) akceptas ke se en la jaro 2000, BRUSELO kune kun 8 aliaj urboj de la EU estus KULTURA URBO en Eŭropo, EBG organizos esperantistajn aktivaĵojn kiel Antverpeno faris en 1993, kondiĉe ke APE kaj FEL konsentus ke tiuj aktivaĵoj inkluzivu la randon kiu, administre, estas aŭ en Flandrio aŭ en Valonio. precizigas ke, dirante tion, ŝi pensas pri la afrika muzeo en Tervuren kaj la memoraĵoj de la batalo en Waterloo. La BEF-anoj konsentas unuanime. En Bruselo-ĉefurbo, ŝi pensas pri vizitoj de la historia centro kaj pri diversaj muzeoj. Necesos starigi respondecan kaj kleran skipon.

FW substrekas ke dum la Eŭropa Kongreso kiu okazos en Oostende en 1999, tuttaga vizito al Bruselo estas planita. FW kaj HF interkonsentas ke la programoj celos aliajn vidindaĵojn kaj ke EBG helpas Oostende pri tiu vizito al Bruselo.

5.7. AM-G pledas por akcepto de la seĝo de BEF kaj EBG en lia domo, Bulvarado Leopold la IIa. HF respondas ke, eĉ se ĝi estas havebla senpaga, estas ŝarĝo kiun EBG ne kapablas plenumi des pli ke la sperto de FEL lernigas nin ke estonte, la subvencioj eble reduktiĝos. Estas tempo de ŝparemo. La ĉeestantaro konsentas. Post diskuto, estis decidite ke la adreso de BEF estos ĉe Sabine BRISON, sekretario de BEF: Karekietlaan 2, avenue des Rousseolles, 1640 St Genesius Rode (Rhode St G). Faks- kaj telefon-numero: 02/3811647

5.8. WdS memorigas nin ke, en 1897, okazis en Belgio la unua kurso de Esperanto. En 1898 fondiĝis en GILLY (apud Charleroi) la unua Esperanto grupo. Ni devas pripensi kion fari por

memorfesti tion.

6-7. Malŝarĝo de estraro kaj elekto de novaj estraro kaj administrantaro

Novaj administrantoj

FEL: Wim DE SMET, Ivo DURWAEL, Ward KUSTERS

APE: G. SOSSOIS, Marcel DELFORGE, Maurice WOUTERS

EBG: A. TSIRIMOKOS, Hélène FALK, Claude GLADY

BEFA: Lucien DE SUTTER

ILEI: Raymond WYLLEMAN

cat C: Fr. SPERBER, Gregoire MAERTENS, Flory WITDOEKT, W.V.d.KIEBOOM, S.

BRISON, A. MERTENS-GOOSSENS

Nova estraro:

Prezidanto: Georges SOSSOIS

Vic-prezidanto(*): Flory WITDOEKT

Kasisto: Marcel DELFORCE

Sekretario (**): Sabine BRISON

(*) Wim DE SMET ne rekandidatiĝas (**) Philippe VAN DAMME eksiĝis.

Kunsido finita je 16 h 1/2

Bedaŭrinde, estis forgesite decidi la daton de la estonta BEF-jarkunsido. Lucien DE SUTTER, kontaktita telefone, konsentas ke ĝi okazos en la Brusela kunvenejo de la fervojistoj se ili disponas pri iu. Estas ja antaŭvidita ŝanĝigi la nunan ejon. Li proponas la trian sabaton, t.e. la 18an de oktobro 1997 ĉar devas ĉeesti kunvenon de la germanaj fervojistoj je la dua oktobra sabato. Sabine BRISON sendos la invitilojn por ke ili atingu la partoprenontojn, du semajnon antaŭ la elektita dato.
